

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 127</i> <i>APRILIO/2002</i></p>
	<p>Monata Beletro Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>	
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 www.anteo.domainvalet.com</p>		



Esperanton, Mi Scias

Ao Te

Mi ne scias
kiel la *Hebrea Psalm'* prikantas
mi ne scias
kiel la *Budaa Sutr'* priskribas
mi ne scias
laŭ kiel volo la terглоbo rotacias
sed mi scias
la sunlum' mallumon certe rompos
malantaŭ vintro
ĉiam sekvas la printemp' florplena

Esperanto,
mi vin komparu
al nubo sopiranta al tagiĝo
mi vin komparu
al la *Hebrea Psalmo*
mi vin komparu
al kantanto liberira kaj Brustlarĝa
mi vin komparu
al anĝel' pac-alportanta
mi vin komparu
al iranto sola en dezerto

Mi vin scias
Esperanto
en rospena, frosta nokto
vi, kun la tuta iluzio de l' homaro
kun espero l' tuta de l' homaro
kun la pure sankta kor' de l'
pilgrimanto

kun la najtingala kantovoĉo
kun la firma volo de dornbirdo
ekvojaĝis

Esperanton
mi scias
en centjara jarringo
sur centjara memoriga folipeco
skribiĝas plene via iluzio
via tristo
viaj penoj
sub piedoj viaj longveturataj
sterniĝas folipecoj kun la disrompita
koro
vi tamen
neniam pensas pri fuĝado

Mi scias
vi iam
de temp' al temp' esperis
ke pejzaĝo l' printempa
neniam forvelkiĝu
mi scias
vi iam
tra l' ruĝ' de l' sola rozo
sopiris al la vermiljono de Edeno
mi scias
en ĉi tiu profitĉasa mondo
vi anĝelo estas
vi sanktulo estas



Esperanto
en la mondo plena je lunlumo
vidiĝas ĉie via bela korp-figuro

Se oni devigas sin fari ion,
Oni ne taŭgas por la regado super la mondo.

Tradukita de *Wang Congfang*

Spegulo

Li Xuefeng

En sia infaneco, Einstein estis ludema knabo. Ĉiutage, li aŭ trapromenis senfare sur la strato aŭ ludis kun siaj knabaj amikoj en bieno aŭ ĉe riverbordo. Vere li similes al infana vagemulo.

Lia patrino ofte maltrankviliĝis pri tio. Ŝi konstante admonish al li, “Ne vivu tiamaniere plu! Se vi ne lernas iom nun, kiel vi povos fariĝi gravulo estonte?” Sed Einstein ĉiam respondis senzorge, “Vidu miajn kunludantojn! Ĉu ili ne kontudas kiel mi?”

Iun tagon en aŭtuno de tiu jaro, kiam li estis 16-jara, lia patro retenis lin, kiu estis ironta fiŝhoki, kaj diris, “Antaŭhieraaŭ mi spertis interesan aferon. Post kiam mi ĝin rakontos al vi, vi iros fiŝhoki, ĉu bone?”

Einstein haltigis siajn paŝojn nevolonte. Patro rakontis, “Hieraŭ, mi kaj nia najbaro Oĉjo Jack iris purigi la grandan kamentubon de la fabriko ĉe la sudo. Se vi volas supreniri al ĝia supro, vi devas surgrimpi laŭ la ferŝtala ŝtuparo instalita sur la vando de la kamentubo. Via Oĉjo Jack grimpis antaŭe kaj mi malantaŭe. Tenante balustradon, ni fine supreniris ŝtupon post ŝtupo. Kiam ni malsupreniris, ankaŭ Oĉjo Jack iris antaŭe kaj mi lin sekvis. Poste, kiam ni ŝoviĝis el la kamentubo, ni trovis strangajon: la korpo kaj vizaĝo de Oĉjo Jack kovriĝis per fulgo, dume nenia fulgero alkoĉigis al mia korpo.”

Kun rideto, lia patro daŭrigis, “Rigardante la aspekton de via Oĉjo Jack, mi pensis, ke mi certe havas la saman aspekton kiel li kun malpuraj vangoj. Do mi iris al la riverbordo por lavadi min. Kaj via Oĉjo Jack, rigardante


ke mi estas senmakule pura, pensis, ke li estas tiel sama kiel mi. Do li nur malzorge lavis sian vizaĝon kaj surstratiĝis. Tio rezultis, ke preterpasantoj ĉiuj ridis kaj ridis ĝis doloriĝo de ventro, kaj ili supozis, ke via Oĉjo Jack estus frenezulo.”

Aŭdinte tion, li kaj lia patro nereteneble eksplodis per ridoj. Post tio, lia patro diris serioze al Einstein, “Fakte, neniu povas servi kiel via spegulo. Nur vi mem estas via spegulo. Se oni prenas aliulon kiel sian spegulon, probable idioto trovas tra la spegulo, ke li estas talentulo.”

Aŭdinte tion, Einstein sentis sin hontema.

De tiam, Einstein apartiĝis de tiuj bubaĉoj. Ofte li prenis sin mem kiel spegulon por sin kontroli, kaj fine la spegulo reflektis brilan lumon de lia vivo.

elĉinigi *Wei Xinyuan*



Spritaĵoj



Lito sur la Aŭto

Vespere, ebrulo alvokis taksion. Survoje li deprenis sian veston kaj ekdormis sur la sidloko. Kun zorgemo, la ŝoforo demandis, “Sinjoro, vi sidas en la aŭto. Senveste vi malvarmumiĝos.”

Aŭdinte tion, la ebrulo iom sobriĝis. Li eksidis kaj demandis, “Kial vi ne avertis min pri tio pli frue?”

“Estas ne malfrue,” murmuris la ŝoforo.

